

La 2an de julio 2014

Japanio komencos militi eksterlande

La 1an de julio la registaro decidis ŝanĝi la interpreton de la 9a artikolo de la japana konstitucio, kiu malpermesas militon.

Jam foje Usono petis (fakte postulis) de Japanio partoprenon en la usonaj militoj, sed ĝisnunaj registaroj ne akceptis tiun peton, pledante, ke la 9a artikolo malpermesas tion. Tial dum la postmilitaj jaroj japanoj neniam mortis kaj mortigis en militoj. Tio estis granda kontribuo al mondpaco, kaj Japanio havanta bildon de paca lando estis alte takstata eĉ en landoj, kie Usono militis/as.

Tamen la nuna ĉefministro Abe Ŝinzoo, dekstrulo, ne ŝatas tiun konstitucion kaj provis ĉiel malfortigi la efikon de tiu artikolo. Kaj ruzege, li ŝanĝis la interpreton de la 9a artikolo kaj aprobis la rajton de kolektiva defendo, kiu ebligas al Japanio militi en eksterlando, sekvante Usonon. Pro tiu ŝanĝo de la interpreto, Japanio ne povos rifuzi usonajn petojn aŭ postulojn kune militi en eksterlando.

Plejparto de la japanoj estas malĝojaj kaj maltrankvilaj pro lia diktatora sinteno. La 1a de julio 2014 povas esti grava turnopunkto de la postmilita japana historio kaj komenco de japana militisma reĝimo.

En la elekto en decembro 2012 multaj japanoj voĉdonis por Liberala Demokratia Partio, havante tro grandan malesperon pri la tiama reganta partio Demokratia Partio. Vere multaj japanoj estis kaj estas stultaj, ne konsiderante la situacion bone, kaj sekve ni devos riski la vivon de junuloj en militoj. Oni devas kompreni, ke la registaro ne protektas vivon de la popolanoj, sed ĉiam utiligas kaj viktimitigas ĝin por profito de la ŝtato kaj kapitalismo. Se ni vidas realon de fukuŝimaanoj, tio estas vere klara.

Voĉoj de fukuŝimaanoj

S-ro Akaŝi Ŝooĵiroo, raportisto, skribas jene pri nuklea akcidento:

Nenio estas pli kontraŭlogika ol nuklea akcidento. Eĉ se TEPCO multege poluas la medion kaj multege damaĝas ekonomie la loĝantojn, nur

TEPCO rajtas decidi regulojn pri kompensa mono. Ĝi neniam akceptas « damaĝojn » kaj « vundadojn » kaŭzitajn de radioaktivaĵoj disĵetitaj el la akcidento kiel sian krimon. Ĝi neglektas postulojn pri kompensa mono kaj neniam sincere traktas tiujn, se la suferantoj ne akuzas al la juĝejo. TEPCO estas tro aroganta, privata kompanio, al kiu mankas konscio, ke ĝi estas atencinto.

Ankaŭ la registaro kaj la reganta Liberala Demokratia Partio neniam pardonpetas de la suferantoj kaj la japana popolo. Do la lasta rimedo estas akuzi tiujn respondeculojn al la juĝejoj. En la tuta Japanio nun en multaj lokoj suferantoj akuzas la respondeculojn al la juĝejoj.

En junio 2012 1324 suferantoj pro la akcidento de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima akuzis TEPCO-n, la registaron kaj dungitajn scienculojn al la juĝejo de Fukuŝima. Ili eldonis libron « Ĉu ni ne povas kulpigi ilin? » (Voĉoj de 50 akuzantoj de Fukuŝima) en septembro 2013. Mi legis ĝin kun granda kortuŝo. Mi tradukos kelkajn el iliaj voĉoj.

Mi havas multajn valoraĵojn en mia eksa domo

Nozaki Kootaroo, 7-jara knabo, fuĝinte el la vilaĝo Iitate, nun loĝanta en la gubernio Gifu.


Pro la akcidento mi ne povas reveni hejmen. Mi jam vizitis tri malsamajn lernejojn. Mi havas malfacilojn. Mi havas multajn valoraĵojn en mia eksa domo.

Mi volas reveni al la domo, kie mi naskiĝis. En la antaŭa lernejo mi havis novajn amikojn, sed kiam mi estis en la unua lernejo, mi devis translokiĝi al alia loko. Kiam mi estis en mia domo, ĉirkaŭe troviĝis herbejo kaj mi vivis kun katoj kaj kaproj, kaj poste mi translokiĝis al iu templo, kie ankaŭ troviĝis katoj, kokoj kaj kaproj. Tie mi havis novajn amikojn, sed mi devis denove translokiĝi al apartamento en alia urbo. Tie estas malpermesite havi bestojn. Mi nun devas resti en la ĉambro legante librojn anstataŭ ludi kun bestoj ekstere. Mi volas reveni hejmen.

La prezidanto de TEPCO kaj aliaj respondeculoj estas sendube krimuloj

Y.C, 11-jara lernantino fuĝinte el la urbo Tamura, nun loĝanta en la

gubernio Gifu



**Kie loĝas miaj amikoj? Ili disiĝis en la tuta Japanio.
(En la elementa lernejo Odaka de Fukuŝima)**

Mi devis fuĝi, ĉar falis multe da radioaktivaĵoj ĉirkaŭ mia domo. Se ne okazus la akcidento, ni povus plu loĝi tie, riparante domon rompitan de la tertremo. Ĝis tiam respondecaj homoj diradis, ke la nukleaj centraloj estas perfekte sekuraj, sed la akcidento okazis. Kiel senrespondecaj ili estas! Multege da homoj suferas. La prezidantoj kaj la respondeculoj de TEPCO estas vere atencintoj.

Mi jam vizitis tri malsamajn lernejojn. Mi neniam renkontis kelkajn el miaj amikojn post la akcidento. Mi havas multajn malfacilojn, sed TEPCO nenion faras por protekti nin. Nekredebla afero! Kial TEPCO ne estas akuzata? TEPCO okazigis gravan akcidenton, kiu influos ne nur nin, sed ankaŭ la sekvajn generaciojn. Kial ĝi ne estas kulpigita? Mi vere deziras, ke la juĝejo klarigu la kialojn de la akcidento kaj kulpigu la respondeculojn.

Mi perdis laboron, manĝejon, domon, monon kaj amikojn

Kobori Juuki, 36-jarulo, fuĝinte el la urbo Miharu al la gubernio Jamanaŝi

Mi havis manĝejon en la urbo Koorijama kaj loĝis en la urbo Miharu

kun miaj edzino kaj unu-jara filino. Mi malfermis tiun manĝejon en 2008 kaj provizis klientojn per kuirajoj el organikaj legomoj. Mi tre amis la belan naturon de Fukuŝima kaj jam havis rondon de samideaj amikoj.

Post la akcidento ni rifuĝis en la gubernio Jamanaŝi. Kiam mi revenis al Fukuŝima, mi detektis 1 mikrosiverton da radioaktiveco ĉirkaŭ la manĝejo kaj 0,4~0,5 mikrosivertojn en mia domo.

* La registara maksimuma normo estas 0,23 mikrosivertoj. En mia urbo la cifero estas 0,05.

Mi sciis, ke mi ne plu povos doni sekurajn manĝaĵojn al klientoj kaj ke ni ne plu povos vivi trankvile en mia domo, do mi fermis mian manĝejon kaj translokiĝis al la gubernio Jamanaŝi. Mi ne plu povas fari tion, kion mi volas, mia amika rondo perdiĝis kaj la komunumo disiĝis. Mi perdis laboron, manĝejon, domon, monon kaj amikojn.

Troviĝas homoj, kiuj kritikas fuĝintojn. Ili plu volas loĝi en Fukuŝima kaj volas senti, ke Fukuŝima estas sekura. Ili ne perdas multon sed certe ili elmetiĝas al radioaktiveco kaj iom post iom malsanĝas. Malsamaj opinioj dividas la loĝantojn.

Mi vivas en kaosa situacio kaj estas en kirloj de suspektoj. Mi fariĝas melankolia kaj ĉie renkontas diversajn malĝojigajn aferojn. Mi estas kolera kontraŭ TEPCO kaj aliaj organizoj, kiuj mensoge propagandis sekurecon de la nukleaj centraloj, kaj mi estas kolera pro tio, ke ili, same kiel antaŭe, senprobleme funkcias.

Mi deziras, ke la juĝejo esploru, kiuj estas atencintoj. Laŭ la leĝoj de Japanio, la juĝejo kulpigu tiujn homojn kaj organizojn.

Mia filino dormis en la lito poluita je 0,6 mikrosivertoj

Anonimino

Nia tre valora hejmloko Fukuŝima. Tiu karega hejmloko estis poluita de radioaktivaĵoj. Fukuŝima havis veran ĉielon, belan naturon, bongustajn akvon, aeron kaj manĝaĵojn. Pro la akcidento de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, akvo, aero, tero kaj manĝaĵoj estis poluitaj de radioaktiveco.

La urbo, kie mia familio loĝis, estis plena de pura akvo kaj bela verdaĵo. Ni aĉetis domon kaj vivis feliĉe kaj trankvile ĝis tiu tago.

Tamen en tiu domo la familia ĉambro estis poluita je 0,8 mikrosivertoj kaj la lito de mia filino en la dua etaĝo, je 1,2 mikrosivertoj. Vidante tiujn

ciferojn, mi estis ŝokita kaj el miaj okuloj falis larmoj. Mi dormigis miajn gefilojn en tiel poluita loko ! Mi kritikis min kaj larmis. Ekstere la cifero estis pli granda : en la ĝardeno la cifero estis 3,3 mikrosivertoj kaj en la fluilo la cifero estis 23 mikrosivertoj ! Vidante tiujn ciferojn, mi konvinkiĝis, ke ni ne plu povas loĝi en tiu ĉi domo, kaj decidis translokiĝi al alia gubernio.



Dozmetro, kiu montras 2,20 mikrosivertojn

Miaj gefiloj adiaŭis siajn karajn amikojn kaj eniris en la novan lernejon, timante, ke ili estos mistraktataj pro sia deveno de Fukuŝima. Je mia trankvilo nun ili havas ĝojan tempon en la nova lernejo, sed foje ili ploras.

Nokte ili ploras, vidante fotojn de siaj amikoj en Fukuŝima.

Mi aŭdis plorajn voĉojn el la banejo lastatempe:

« Mi amas Fukuŝima-on. Mi volus fini la elementlernejan kurson kun miaj amikoj. Mi volus ludi pli multe kun ili. Maljunuloj en la najbaraĵo estis tre bonkoraj. Ĉiun tagon miaj familianoj povis kune dormi en la sama ĉambro. Ni ĉiuj povis kune loĝi. Mi amas Fukuŝima-on. Kio okazis al mia vivo? Kial tiu mizera situacio okazis? »

Pro la akcidento ni devis lasi diversajn aferojn hejme kaj perdis multajn aĵojn : homa ligo, valoraj familianoj kaj karaj amikoj, kara lernejo, kara urbo, loko, en kiu ni trankvile vivis, kaj bela hejmloko. Kion plu TEPCO kaj la registaro rabos de la infanoj kaj de ni ?

Ni volas reveni, sed ne povas. Ni bezonas neimageble multajn jarojn

por senpoluigi la teron. Kiam mi pensas pri tiuj jaroj, mi estas plena de malespero.

Ni repagadas al la banko lumonon, per kiu ni aĉetis la eksan domon nun neloĝeblan. Ni estas lacaj pro malstabla vivo. Ankaŭ miaj infanoj estas lacaj en nekutima cirkonstanco kaj inter novaj homoj. Ili komencis plendi pro kapdoloro kaj ventrodoloro. Nia vivo jam preskaŭ atingis netolereblan, financan kaj psikan limon.

Mi forte deziras, ke la juĝejo klarigu la kaŭzon kaj la respondecon de la akcidento kaj ĝuste kulpigu la respondeculojn.

Mia filino rezignis havi infanon

Satoo Ŝooko, 55-jarulino loĝanta en la urbo
Koorijama de la gubernio Fukuŝima

Mi estas urbano de Koorijama, sed gepatroj de mia edzo loĝis en la urbo Naraha. La 24an de februaro 2011 mia bopatro mortis. La 11a de marto estis du tagojn post la funebra ceremonio de « La DudekSepa Tago » de lia morto kaj mia filino restis en la urbo Naraha.

Kiam okazis la akcidento, ni ĉiel klopodis savi miajn familianojn el Naraha. Ni sukcesis savi la bopatrinojn, onklinon kaj mian filinon antaŭ ol oni eligos radioaktivaĵojn el la reaktoroj, sed du semajnojn poste, mia onklo, kiu rifuĝis en gimnastikejo, mortis pro pneŭmonio. Mia bopatrino fariĝis melankolia kaj fariĝis demenca. Mi devis prizorgi miajn bopatrinojn kaj onklinon suferantan Parkinson-malsano. Pro atakemo de mia bopatrino kaj ofta zorgo pri mia onklino, kaj pro timo pro radioaktiveco, mi mem fariĝis melankolia.

Pro la nuklea akcidento ĉio ŝanĝiĝis. Mia domo en Naraha rompita de la tertremo fariĝis neloĝebla pro ŝimo kun putrintaj tatamoj. Eĉ ŝtelistoj venis. Se ne okazus la akcidento, la stato de la domo ne fariĝus tiel mizera. Mia domo, kiun ni pene konstruigis per multe da lumono, fariĝis poluita de radioaktiveco.

Mi estas plej maltrankvila pri miaj gefiloj. Mia ĵus edziniĝinta filino rezignis havi infanon. Mia 31-jara filo, kiu baldaŭ edziĝos, havas maltrankvilon pri sia estonta bebo.

Por ke miaj gefilinoj ne prenu radioaktivaĵojn, mi ĉiel eviti uzi nepoluitajn manĝaĵojn, sed ĉar ni vivas en Fukuŝima, ni daŭre elmetiĝas al radioaktiveco. Neniu el miaj parencoj opinias, ke ili povos reveni al sia

hejmloko Naraha.

La nuklea akcidento estas grandega krimo, rabante de la loĝantoj vivon kaj vivrimedon, sed neniu estis akuzata. Tio ne estas permesebla. Mi deziras, ke la juĝejo klarigu la respondecon de TEPCO kaj la registaro.

Mia filo laboras en la nuklea centralo n-ro 1

Nagsaŭa Toŝiko, 62-jarulino loĝanta en la urbo
Tamura

Mi loĝas en tiu ĉi urbo ekde mia naskiĝo. Ĉirkaŭ mia domo en printempo freŝe verdiĝis kaj en aŭtuno etendiĝis oraj kampoj de rizplantoj. Mia edzo longe laboris en la nuklea centralo de Fukuŝima. Li diligente laboris, kredante sekurecon de la centraloj. Sed ĉio estis poluita de radioaktiveco. Mia edzo, kiu jam longantaŭe malsaniĝis, fariĝis pli malsana post kiam ni ekloĝis en provizora domo.

Ankaŭ mia filo laboras en la nuklea centralo n-ro 1, kiu eksplodis en marto 2011. Mi rekomendas, ke li ĉesu labori tie, sed li ne aŭskultas min. Li iras labori, dirante, ke li povos vivi ĝis kiam lia filino fariĝos 10-jara. Mi estas tre malĝoja. Mi volas, ke li restu en pura aero hejme, sed ĉirkaŭ ni ĉio estas poluita. Kion ni faru?

Neniu spertu same kiel ni. Mi deziras, ke samo ne ripetiĝu kaj la juĝejo klarigu, kiuj estas respondecaj pri tiu akcidento.

Mi ne povis kredi la ciferon 100 mikrosivertoj

Kikuĉi Mucuo, 63-jara terkulturisto
Lia loĝloko estas kaŝita.

Mi organike kultivis rizplantojn kaj legomojn en Fukuŝima kaj fieris pro la bongustaj rikoltaĵoj, sed ĉio estis poluita de radioaktiveco el la akcidento. Ĉio perdiĝis kaj la urbo fariĝis neloĝebla.

Mi jam antaŭe posedis dozmetron. Kiam okazis la akcidento, mi mezuris la teron kaj trovis, ke la tero estas poluita je 100 mikrosivertoj. Vidante tiun grandan ciferon, mi fariĝis kvazaŭ svena kaj opiniis, ke ĉio estas finita. Mi nur pensis fuĝi de tiu tro poluita, neloĝebla loko, kaj rapidis al la urbo Kioto, kie mia onklo loĝis.

Tiu neriparebla loko, poluita naturo kaj mensa doloro ! Ni bezonos

miulojn da jaroj por reakiri senradioaktivan vivon, laboron kaj komunumon. Kiu respondecas pri tiu akcidento? Mi deziras, ke la juĝejo esploru krimojn de la akuzitoj.

Dufoje mi estis forĵetita de la registaro

Taĉibana Rjuuko, 71-jarulino, fuĝinta el Namie kaj nun loĝanta en la urbo Motomija de la gubernio Fukuŝima

Ni havis maltrankvilon pri danĝero de la nukleaj centraloj kaj agadis kontraŭ la atomenergia politiko. Kiel ni antaŭvidis, la akcidento okazis la 11an de marto 2011. Ekde tiu tago mia nomada vivo komenciĝis. Ni, maljuna paro, perdis sian hejmon kaj post 10-fojaj translokiĝoj nun vivas en provizora domo en la urbo Motomija.



Provizoraj domoj por rifuĝintoj

Eĉ post la akcidento TEPCO kaj la registaro estas malvarmaj al ni, neglektante niajn malĝojn kaj koleron. Post la dua mondmilito, kiel nacian politikon la registaro enkondukis nuklean energion kun devizo « Atomenergio por paco », kaj TEPCO, sekvante la politikon, konstruis 10 reaktorojn en la regiono Futaba de la gubernio Fukuŝima. Neniam ŝanĝiĝis ĝia aroganta sinteno: “Ni donacis/as riĉecon al malriĉaj loĝantoj per la nukleaj centraloj!”

Kio estas respondeco de la registaro? Kio estas respondeco de grandaj

entreprenoj, kiuj devintus plenumi sian socian rolon ? Pri la respondeco de la dua mondmilito Japanio ne kritiks sin serioze. Ĉu denove Japanio ne kritikos sin pri la nuklea akcidento?

Fine de la dua mondmilito mi fuĝis el Manĉurio en Nord-orienta Ĉinio, tiama japana kolonio. Jam la japana armeo frue fuĝis, lasante japanajn enmigrintojn tie. Ni estis forĵetitaj de la japana registaro. Ankaŭ ĉi-foje ni estas forĵetitaj. Mi spertis du-fojan forĵetadon fare de la registaro.

Por malkovri veron, por krei justan socion, por protekti geknabojn, kiuj vivos en la 21a jarcento kaj por realigi socion sen timo pro radioaktiveco, mi deziras, ke la juĝejo helpu nin. Vi estas mia sola espero.

HORI JASUO